

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la vivo en svisa montara vilaĝo.

Dum la du lastaj elsendoj kvin gelernantoj dekunu- ĝis dektri-jaraj prezentis al vi sian vivon en la vilaĝo La Sagne. Vi certe konstatis, ke ili jam sufiĉe bone parolas la mondan lingvon, eĉ se ilia voĉo kelkfoje timtremis antaŭ la mikrofono !

Vi certe havos intereson aŭdi, kiel komenciĝis la instruado de nia lingvo en La Sagne. Tion mi hodiaŭ rakontos al vi.

Ofte gesamideanoj vizitas min. Kun plezuro mi tiam profitas prezenti al ili mian vilaĝon. Ni ne nur vizitas nian muzeon, sed ankaŭ kamparistojn kaj horloĝistojn. Pro tio iom post iom la vilaĝanoj kutimiĝis konsideri la mondan lingvon kiel tre valoran perilon intergentan. Kaj subite esprimiĝis la deziro vidi nian lingvon enviciĝi inter la instrufakojn en la vilaĝa lernejo. Tiu deziro havas rilaton kun la hungara revolucio.

Nia vilaĝo ricevis du familiojn rifuĝintajn el Hungario. Bedaŭrinde okazis lingvaj malfacilaĵoj. Dum kongreso mi renkontis hungaran samideanon. Mi invitis lin veni dum kelkaj tagoj en mian vilaĝon por faciligi niajn kontaktojn kun la hungaraj familioj. Vilaĝanoj deziris babili kun mia gasto. Mi ilin invitis dum vespero kaj fariĝis interpretisto. Mi havis multe da laboro, ĉar la diskutado estis tre vigla. Iom post iom la babilado forlasis la hungaran civilizon por la esperanta. Kaj la unuanima konkludo al tiu simpatia vespero fariĝis la deziro vidi plej rapide la mondan lingvon instruitan en la lernejo. Inter la ĉeestintoj troviĝis gepatroj de miaj gelernantoj. Ili donis al mi tujan permeson ekinstrui esperanton al siaj infanoj. Mi tamen deziris ricevi oficialan apogon. La lerneja inspektoro, kiu siatempe loĝis en la domo de la UEA-delegito en la urbo La Chaux-de-Fonds, tuj apogis mian demandon. La lerneja komisiono ankaŭ devis diri sian vidpunkton. Al ĝiaj anoj mi montris kelkajn belajn kajerojn de interlerneja korespondado *Grajnoj en Vento*. Ili konstatis, ke la monda lingvo permesas interesajn kontaktojn kun aliaj klasoj. La komisianoj timis, ke esperanto ne estu kapabla fariĝi literatura lingvo. Tuj mi recitis poemon el *Kontralte* de Marjorie Boulton. La lerneja komisiono tiam decidis permesi la malfermon de esperanto-kurso je tri kondiĉoj : unue, ke la gepatroj konsentu ; due, ke la gelernantoj estu bonaj en la franca ; trie, ke la kursanoj promesu fideli la kurson dum la tuta jaro. Tiuj tri kondiĉoj bone taŭgis por seriozigi la instruadon de tiu nova nedevisa fako.

La gelernantoj tuj entuziasmiĝis. Iliaj rapidaj progresoj estis kuraĝigilo. Ĉe la fino de la jaro, kiam la ĵurnalistino kaj prelegistino fraŭlino Joŝiko Kaĵino vizitis nian vilaĝon, la infanoj kun granda ĝojo konstatis, ke ili ne nur komprenas sian instruiston, sed ankaŭ japaninon.

Ĉiujare mi provas aranĝi en mia vilaĝo esperantistan manifestacion. Tio permesas al miaj gelernantoj kontakti eksterlandanojn, kun kiuj ili povas ekuzi la lernitaĵojn. Post fraŭlino Joŝiko Kaĵino ni tiel havis la viziton de alia japano : sinjoro Eizo Ito, unu el la estroj de la movado Oomoto. Mi ĉiam rememoros la entuziasmiĝon de tiu sesdekjarulo post promenado tra la vilaĝo kun kelkaj geknaboj : li ĝojis kaj preskaŭ kantis sian plezuron konstati, ke la monda lingvo ne nur konvenas al plenkreskuloj, sed ankaŭ al la infanoj. Li ĝojegis kaj kriis : « *La Sagne ne nur estas belega montara vilaĝo, sed samtempe verda vilaĝo !* »

Aliaj vizitantoj venis el Novzelando. Estas gesinjoroj Hamvai. Ili ankaŭ multe ĝojis pri la ebleco renkonti lernejanon scipovantajn la mondan. Post sia reveno en Novzelando sinjoro Hamvai skribis al la prezidanto de la lerneja komisiono. En tiu letero li diras, ke dum sia prelegvojaĝo tra Eŭropo li renkontis geknabojn povantajn kompreni esperanton nur en La Sagne kaj en dana vilaĝo.

Nia vilaĝo sin pretigas por ricevi denove japanojn : sinjorojn Kjtaro Degiĉi kaj Joŝimo Umeda, junulojn de la movado Oomoto.

Estas tamen ombro al nia pedagogia eksperimento. Nian lingvon lernas ja tre rapide la infanoj. Sed kiam ili forlasas la vilaĝan lernejon por la urba gimnazio, kie esperanto ne plu estas instruata, ili ĝin rapide forgesas. Pedagogie estas konstato, ke tion, kion oni tre rapide lernas, oni ankaŭ rapide forgesas. Ni esperu tamen, ke post la studo de plej diversaj lingvoj : ĉu la germana, angla kaj itala, kiel naciaj lingvoj, ĉu la latina, greka kaj eĉ hebrea, kiel klasikaj lingvoj, ke post la trapaso de la abiturienta ekzameno, kelkaj revenos al la monda lingvo ekrenkontita en la vilaĝa lernejo.

Ofte malgrandaj komunumoj ludas gravan rolon en la nacia aŭ monda vivo dum multloĝataj urboj kelkfoje preskaŭ ne estas konataj. La spirita radiado de loko ne dependas de la nombro de ĝiaj loĝantoj, sed de la kuraĝo de ĝiaj pensantaj elementoj. La Sagne, pro la originala personeco de siaj loĝantoj, ludis sufiĉe gravan rolon en la spirita vivo de nia lando. Kaj hodiaŭ la esperantistaro de Svislando rigardas al tiu ĵurasa vilaĝo, kies prezidanto s-ro William Botteron kaj kies lernejestro s-ro Numa Vuille, ambaŭ kamparistoj, inaŭguris per siaj subskriboj la kampanjon « *Esperanto instruenda lingvo* », kies superaj klasoj, sub la lerta gvidado de s-ro Julien Junod, ne nur famiĝis per la gajno de du kantpremioj, sed ankaŭ per la prezento dum impona pedagogia manifestacio de kantato de Cezaro Frank, tio en la monda lingvo. La geknaboj jam rakontis al vi pri tiu okazintaĵo dum la pasinta elsendo.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la vivo en svisa montara vilaĝo. Se vi deziras ricevi bildon de tiu vilaĝo, skribu al Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-